

1918
100
2018
SPOLEČNÉ STOLETÍ

Bulteno

de Esperantista Klubo en Prago

Časopis Klubu esperantistů v Praze

N-ro 3/2018 (214) 28. 10. 2018

Sukceso de Eva Pechová en Parizo



Foto: www.poesie-en-liberte.fr

Studentino Eva Pechová de la praga UMRUM gajnis en majo 2018 la 3-an premion en la Esperanta kategorio de la franca konkurso *Poésie en liberté* kun sia poemo „Senti la momenton“. Esperanto estis konkursa lingvo la unuan fojon en la 20-jara historio de tiu ĉi evento. (>> s. 18)

EL LA ENHAVO

Kroniko de la jaro 2018	2
Novajoj el la eldonejo KAVA-PECH	3
Ĉeĥaj landoj – kiel vojkruciĝo	5
La 28-a de oktobro 1918 en Nový Knín	12
Interparoloj kun TGM	15
Farsaĵo kun la Parko de Morávek	16
Poetino Eva Pechová	18

O časopisu

Evidenční číslo: MK ČR E22980
Vydatel: Klub esperantistů v Praze
Sídlo: Jirečkova 5, Praha 7
Vychází třikrát ročně
Web: <http://bulteno.cs-retromusic.net>
Redaktor: Tomáš Břicháček
Korektury: Pavol Petřík
Kontakt: t.brichacek@seznam.cz

Kroniko de la jaro 2018 *Aranĝoj kaj okazintaĵoj*

08/02/2018 – prelego de T. Břicháček pri la maniero de esprimado de la organoj de la EU (*klubejo*)

24/02/2018 – tradicia renkontiĝo de la klubo E-mental' en la praga bestĝardeno

28/02/2018 – Esperantlingva miso ĉe sankta Pankraco en Prago 4 celebrita de M. Kašparů kaj dediĉita al M. Smyčka; kantis Jolana Smyčková kaj David Haan

08/03/2018 – prelego de P. Chrdle pri ĉeĥaj UNESCO-monumentoj (*klubejo*)

22/03/2018 – prelego de Phillippe de Vos pri lia malnovgreka-esp. vortaro (*kl.*)

05/04/2018 – literatura kunveno ĉe la rakonto *Sepultitaj revoj* de R. Cílek (*kl.*)

07/04/2018 – premiero de Esperantlingva opero *Sternenhoch* en Nacia teatro

09/04/2018 – eldonita Bulteno No. 1/2018

13–15/04/2018 – E-mentala internacia aranĝo *13-a BIERo* en Třeboň

02/05/2018 – festo de la 20-a datreveno de la klubo E-mental'

17/05/2018 – prelego de Stanislava Vodičková pri kardinalo Josef Beran (*Archiv bezpečnostních složek, Praha–Braník*)

25/05/2018 – studentino Eva Pechová gajnis la 3-an premion en la Esperanta kategorio de la konkurso *Poésie en liberté* en Parizo

27/05/2018 – E-mentalanoj partoprenis la karitatan projekton Briko

31/05/2018 – volontuloj preparis katalogon de la libraro de nia klubo

10/06/2018 – E-mentalanoj partoprenis la Kuron por Paraple

14/06/2018 – eldonita Bulteno No. 2/2018

24/06/2018 – 12-a E-mentala pikniko en Bärensteine

25/08/2018 – 13-a E-mentala pikniko en Krupka

04/10/2018 – prelego de T. Břicháček pri poetino Eva Pechová (*klubejo*)

26–28/10/2018 – E-mentala internacia aranĝo *14-a BIERo* en Rychnov n./K.

28/10/2018 – eldonita Bulteno No. 3/2018

01/11/2018 – seminario pri kronikoj de pragaj esperantistoj (*klubejo*)

30/11–02/12/2018 – E-mentala Kristnasko

08–09/12/2018 – E-mentala internacia aranĝo *6-a Granda lokŝumado* en Bratislavo

13/12/2018 – Zamenhofa kaj Kristnaska festo en Prago

16/12/2018 – E-mentala internacia aranĝo *5-a Antaŭkristnaska kolbasumado* en Saksio


Prosíme, nezapomeňte zaplatit klubové **členské příspěvky na rok 2019**. Výše ročního příspěvku činí **100 Kč**; pro studenty a seniory **80 Kč**. Můžete zaplatit osobně při našich schůzkách nebo bankovním převodem na **bankovní účet č. 2801096435/2010**. Při bankovním převodu uveďte raději svoje jméno. Kontakt: Jiří Mišurec, misuj@email.cz.

Termíny schůzek klubu listopad 2018 – březen 2019

1. 11., 15. 11., 29. 11. / 13. 12. / 10. 1., 24. 1. / 7. 2., 21. 2. / 7. 3., 21. 3.

Novaj el la eldonejo KAVA-PECH


Petr Chrdle



En Bulteno 1/2017 mi prezentis la verkon de Vlastimil Novobilský en la ĉeĥa *František Vladimír Lorenc: Svědectví o životě a díle neobyčejného člověka*. Kaj jam malpli ol unu jaron pli poste aperis ĝia Esperanto-versio *Francisko Valdomiro Lorenz: Atesto pri la vivo kaj verko de eksterordinara homo* en traduko de Margit Turková. Multaj demandas, kial la verkon ne esperantigis la aŭtoro mem, ja perfekta esperantisto kaj aŭtoro de pluraj Esperantaj verkoj kaj tradukoj (ekzemple kune kun sia edzino Věra Novobilská li tradukis *Taglibro de mia frato* de Chava Pressburger pri la juda talentita knabo Petr Ginz, kies junan vivon finigis nazioj en

gaskamero). La kialo estas, ke mi nepre volis eldoni la libron antaŭ la solena inaŭguro de la memortabulo pri F. V. Lorenz sur la ekstera muro de la biblioteko en Vrdu (al kiu nun administracie apartenas Zbyslav, la naskiĝvilaĝo de Lorenc), kiu nun portas lian nomon. Kaj bedaŭrinde prof. Novobilský pro grava malsano ne povis mem dediĉi sin al la esperantigo de sia verko, sed li konsentis, ke ĝi estu tradukita de alia esperantisto; kaj mi estas dankema al Margit Turková, ke ŝi transprenis tiun taskon – kaj sukcese.

Ampleksa verko (385 paĝa) de elektitaj poeziaĵoj de Sali Bashota *La ŝtono de la amo* verkita en la albana, esperantigita de Bardhyl Selimi, estas duobla unikaĵo, ĉar ne troveblas en katalogoj ĝis nun iu kosova poezio en Esperanto, kaj ankaŭ ne iu eldonita en Ĉeĥio. Temas pri poezio kaj poezia prozo de unu el la plej elstaraj vivantaj poetoj de Kosovo, kiu en siaj verkoj respeguligas malĝojon, doloron kaj senesperon de albanoj en Kosovo, sed ankaŭ amon, revon kaj esperon je nacia revekigo.





Post mirakla elĉerpiĝo de la memorlibro de fama aŭstra esperantisto Martin Stuppniĝ *Home en senhomeco* en traduko de Jozefo Horvath, estis eldonita ĝia dua eldono kun du novaj aldonaĵoj: de la aŭtoro, koncize pri siaj vivo post la milito kaj pri siaj politikaj opinioj kaj de Petro Chrdle pri la aŭtoro. Sed elĉerpiĝis ankaŭ la germana eldono, tamen KAVA-PECH jam preparis la duan eldonon en la germana kun enmeto de ĉiuj aldonaĵoj, kiuj estas en la Esperanto-eldono (germanigitaj fare de Reinhard Fössmeier). Kaj jen bona novaĵo por la komencantoj, kiuj ankoraŭ ne kuraĝas legi ducent-paĝan libron en Esperanto: Tiu grava verko jam estas tradukata en la ĉeĥan. La malfacilan taskon transprenis (post rezigno de la antaŭa tradukanto, kiu promesis, sed ne plenumis tion) Jindřiška Dubinová. Ĝi aperos espereble en la jaro 2019.

Okaze de la ekumena kongreso en Poděbrady en ĉi-jara aŭgusto estis eldonitaj kernaj ĉapitroj de la plej grava verko de Jan Hus *Pri la eklezio*, laŭ elekto kaj en traduko el la latina fare de Gerrit Berveling, kompletigita per postparolo pri la vivo kaj verko de Jan Hus, verkita de Petro Chrdle, kaj riĉa bibliografio de la verkoj de G. Berveling. Ĉi-kaze decas klarigi la rilaton inter la verko (kaj Jan Hus entute) kaj ekumenismo: La hodiaŭa sinteno de la katolika eklezio estas multe pli komprenema rilate al Hus. Papo Johano Paŭlo la 2-a esprimis ne nur kompaton pri lia kruela morto, sed ripete deklaris, ke la persono kaj instruo de Hus devus hodiaŭ kristanojn kunigi, ne disigi.

Momente estas presata (aperos la 20-an de novembro) la dulingva libro *Lorenaj fabeloj* en la loren-germana kaj Esperanto. El la loren-germana originalo Lothringer Märcher ĉiujn 11 fabelojn tradukis al Esperanto Benoît Phillipe. Jen por gustumo la titoloj de kelkaj: Pri la trumpetulo, Johano kaj la kateto, Pri leono, urso kaj lupu, La tri muzikantoj, ...). Per 20 ĉarmaj koloraj bildoj la libron ilustris Pavel Rak.

Pli da informoj pri la libroj de KAVA-PECH vi trovos ĉe <https://kava-pech.cz>.



Ĉeĥaj landoj – kiel vojkruciĝo

Margit Turková

Ni ne enrigardu en la plej antikvajn tempojn de ĉeĥaj regionoj, kiam tie ĉi miksiĝis diversaj gentoj migrantaj, kiujn laŭlegende algvidis la prapatro Ĉech, por finfine instaligi sur la tero, kiun oni nomas **Čechy (Ĉeĥio)**. La lando tiam ne estis homogena, krom la ĉeĥaj tie troviĝis aliaj gentoj, pro tio ili parolis per diversaj lingvoj kaj dialektoj.

La ĉeĥan landon oni nomas „koro de Eŭropo“: se oni rigardas mapon, vere videblas, ke Ĉeĥio havas preskaŭ la formon de korsimbolo... sed kiel en la koro, pulsas ankaŭ en ĝi la vivo, kiun ebligas la sango trafluanta la vejnojn...

Ni nun cerbumu – sed el pli subjektiva rigardo, ol historie objektiva, kiuj estas la „vejnoj“ kaj kia estas „la sango“, kiun ili venigas kaj eligas en- kaj el-lando, kiu geografie kuŝas „sur la vojkruciĝo de eŭropaj landoj.“

Neŝanĝebla estas la fakto, ke nia(j) lando(j) estas ĉirkaŭita(j) de gravaj najbaraj ŝtatoj – kaj tiu ĉi situo destinis nian ŝtat-sorton.

La plej signifa certe estas la influo germana. Sen elnombri la faktorojn ekonomiajn oni povas supozi – kaj konstati – ke la germana fenomeno havis fortan influon kaj premon al la unuaj slavaj gentoj – kaj tio ne tro ŝanĝiĝis. Se ni volas sekvi la evoluon de la ĉeĥa nacio kaj poste de la ĉeĥa ŝtat-formo, oni devas okupiĝi pri tri gravaj fenomenoj:

- pri la ekonomik-politika
- pri la religia
- pri la kultura – precipe lingva

La unua estas certe la plej grava, sed por momento ekster nia ĉi prelegtemo. Tial ni okupiĝu (kompreneble, ke ne elĉerpeble) pri la fenomenoj religia kaj lingva, kiuj estas stamoj de kulturo en ĉiuj nacioj. Pli forta estas certe la fenomeno **religio**. Ni estu en la 9-a – 10-a jarcentoj, kiam kun forta impeto trapuŝadis sin la religio rom-katolika. Anticipe ni sciu, ke la nuna ŝtato, kiu nomiĝas **Ĉeĥa respubliko**, havis de la komenco du gravajn partojn: la parton Ĉeĥio (konata ankaŭ kiel Bohemio, de keltaj invadoj), kaj la parton Moravio. Dume en la parto bohemia la slavaj gentoj ne estis unuiĝintaj, sed senĉese en la stato de sangoprenanta batalo, la parto moravia estis firma formacio nomata „Grandmoravia regno“, kies estro estis Svatopluk II. Li estis saĝa reganto, kiu invitis en sian ŝtaton evangeliistojn – la fratojn Cirilon kaj Konstantenon (devenantaj el Tesaloniko, Grekio), ke ili semu kulturajn semojn en la formo de rom-katolika eklezio, sed ke la ritojn oni celebru en lingvo nacia – do slava. La

slavan lingvon oni parolis ĝenerale, sed la skribo-formo ne ekzistis. La nekontestebla merito de la Fratoj estas, ke ili kreis kaj inventis funkciantan alfabeton similan al la najbaraj slavaj lingvoj, kiun ili nomis „cirilico“. Do, jen la kerno de la nacia edukado, kiun gvidis senescepte religianoj (kanonikoj) – same kiel en aliaj landoj.

Sur la bohemia parto de Ĉeĥio, kiu kuŝas najbare de germanaj (kaj polaj) limoj, oni ne povas elspuri strebojn slav-utilajn. La germanaj najbaraj suverenoj ĉiam opiniis tiujn regionojn parto de sia rego-sfero; do, ne finiĝis senĉesaj kvereloj kaj bataloj inter germanaj kaj slavaj princoj. Tamen plej fifamiĝis la kverelo inter la ĉeĥaj princoj – la fratoj Boleslao kaj Venceslao, pro la murdo de la lasta. Tio okazis en la j. 929. La martiro poste estiĝis patrono de la ĉeĥa lando – do sankta Venceslao. Senrigarde de la kverelo-kerno (do hered-postuloj) li estis sanktigita kiel lumo de la rom-katolika eklezio, ĉar li estis ties varmkora filo.

Sed jam antaŭ la supre priskribitaj eventoj disfalis ŝajne tre firma regolando Granda Moravio, baldaŭ post la morto de Svatopluk II, pro la premo de hungaroj. La evangeliistoj Cirilo kaj Konstanteno estis elpelitaj fare de germanaj monaĥoj, kiuj plene okupis ĉiujn sferojn de la lando, neniigis la religiajn ritojn en la slava lingvo kaj ekstartis la edukadon en la germana kaj en la latina, ĉar ĉiuj kanonikoj la lingvojn bone regis.

Sed nin interesas la situacio koncerne popolon. Oni supozas, ke la nacioj senĉese parolis la lingvon slavan (do la ĉeĥan, eventuale la slovakon) en diversaj dialektoj, sed la germana lingvo fariĝis de tiam neevitebla elemento en niaj landoj – oni ne devas substreki, ke precipe en la tavoloj sinjorecaj kaj oficialaj – do ŝtataj. Kial ne... Pluaj gravaj dinastiuloj, precipe la Premislidoj (Přemyslovci) havis dum jarcentoj kontaktojn kun la germanlingvaj najbaroj, edziĝis al germanaj, aŭstraj, polaj princinoj, edukadis siajn infanojn en la germana kulturo (krome ankaŭ en la latina). La pinto de la koncerna afero certe estas la regado de Karolo IV., kiu estis la reĝo de germanaj kaj ĉeĥaj landoj (samtempe havanta la titolon „Romia imperiestro“). Se la sankta Venceslao estas nomata „Patrono de la Ĉeĥa lando“, Karolo IV. estas nomata „Patro de la patrolando“. Ni demandu: Ĉu plenrajte li ricevis la titolon? Post preskaŭ 700 jaroj de post lia reĝado (+ 1378) oni povas objekte proklami: Jes, plenrajte! Ĉar en lia persono naskiĝis superulo, kiu ne havis komplekson pro sia deveno el „malgranda lando“. Kvankam de li regata lando estis preskaŭ tuta Eŭropo, do preskaŭ senlima, li tamen proklamis, ke lia koro apartenas al Ĉeĥio. Kaj li faris multon por glorigi sian naskiĝlandon. Ni ekspliku nur unu agon – el la urbo Prago li faris ĉefurbon de sia vasta imperio. Tiu, kiu konas Pragon, tiu certe dankeme konfirmas lian decidon. De tiam ĝi havas epiteton: Praga - Caput regni. De tiam ĝi estas „ora Prago“, la „cent-tura urbo“ k.s.

Se ni revenas al nia lingva tereno, ni substreku: la malgrandan ĉeĥan

lingvon li faris oficiala kontaktilo, apud la germana kaj latina. Li – fantaziulo – eĉ rekomendis al siaj imperi-regantoj, ke ili kaj iliaj infanoj lernu la ĉeĥan lingvon!

Oni povas diri, ke Karolo IV. faris el niaj landoj vere „vojkruciĝon“, ke li malfermis „irejojn“, tra kiuj povis flui tien kaj reen la elementoj ĉu politike-sociaj, ĉu intelektaj kaj spiritaĵoj. Kaj tiuj vere influis: el Anglujo nome viklefismo, kiu trovis en nia lando homojn preparitajn ĝin akcepti, ĉar da kaŭzoj por kritiki eklezion estis sufiĉe ankaŭ en nia lando. La imperiestro, Karolo IV., estis mem granda favoranto al eklezio, li ne ŝparis sur tiu ĉi kampo... La kapo de la menciita influo elstaris en la persono de la universitata Majstro Jan Hus (Johano Hus). Lia trista sorto estas sufiĉe konata – lia vivo finiĝis sur la brulanta ŝtiparo en Konstanco. Ĝuste post unu jaro sekvis lin sammaniere lia disĉiplo – kanoniko, la Majstro Hieronimo la Praga.

Ke en la nomo de Hus disvolviĝis baldaŭ la detruaj militoj en la tuta Eŭropo, ne kulpis Hus. Oni devas tion ĉi-loke substreki, ĉar regas falsa opinio, ke Hus estis la instiganto kaj la popolanoj nomitaj „husitanoj“ ekstaris por plenumi liajn sociajn postulojn... Ne – Hus estis devota katoliko, kristano, kiu postulis **nur** purecon de la vivo: sed ne nur ĉe kanonikoj, same li admonis popolanajn. Li starigis kontraŭ tio puran vivon de unuaj kristanaj komunumoj, kiujn fondis la Kristo-disĉiploj. Do Kristo estis por li unusola aŭtoritato, ne papo. Pri tio li insistis - pro tio li devis morti!

Do okazis, kio okazis... La husitanaj popolanaj trupoj invadis tutajn landojn – kaj ne nur ĉeĥajn, postulante **justecon**. La konfliktoj kaj bataloj inter ili kaj kruckavaliraj armeoj estas ankaŭ bone konataj, same la konsekvencoj...

Sed ni revenu al nia „kampo“, al la temo de intelekto-sociaj aferoj. Oni ne neglektu, ke danke al husitana movado plifortiĝis la memstareca sento en nia nacio. Ĝin iniciatis kaj pri ĝi zorgis precipe la ĉeĥdevenaj majstroj en la universitato. Ili atingis sian „celon“, la ĝistiam germanlingva instruado estis dispartigita je la ĉeĥlingva kaj germanlingva. La „sukceso“ estis tia, ke germanaj majstroj forlasis la universitaton, kio kompreneble malfortigis la aferojn koncerne la instruadon, la universitato perdis sian bonan renomon, en la mondo... Oni vidas, ke la germana fenomeno estas neeviteble enradikiĝinta en nia lando; ĉar ĝi „ne falis el la ĉielo“. Ĝin ja semis la suverenoj ĉeĥaj, precipe la Premislidoj, kiuj en la 13-a jrc. alvokis germanojn por koloniigi nedisvolvitajn, nekulturitajn ĉeĥajn regionojn kaj fari el ili ekonomie fortan landon. Tio okazis, tio estas ĝis nun nekontestebla fakto, tion oni devas ĉiam konscii...

Post la husitana epoko, kiam la tuta Eŭropo „kirliĝis“ pro influo de luteranismo iranta el germanaj landoj, la nia ne povis resti netuŝita. La

postuloj pri memstareco, precipe lingva, pri pli pura vivo, formiĝis en la nova eŭropeca konfeso, kredo, religia influo – do protestantismo. Ĝi estis avide akceptita de la ĉeĥa sinjoraro (kompreneble ne de la tuta), kaj enradikiĝis en la popol-koro de nia nacio. Oni povas diri, ke la „animo de nacio“ puriĝis, precipe sub gvido de protestantismaj kleruloj, kiuj formis la organizon „Ĉeĥa Frataro“, kies episkopo fariĝis Jan Amos Komenský, monde konata kiel Komenio. Laŭ aplikado de Sanktaj Skriboj – do Biblio, ĝi edukadis la nacion en ĉiuj bonaj formoj de la vivo – religia, spirita, lingva, moraleca. La nobelulo Karel el Žerotín ebligis fondi presejon en sia sid-loko, kie oni presis Biblion en la ĉeĥa lingvo. Tio estis en la tempo, kiam en Anglujo oni persekutadis pro angla-lingva traduko de Biblio...

Sed oni ne povis eviti tuteŭropan konflikton inter katolikismo kaj protestantismo. Sur ambaŭ flankoj preparis sin fortaj taĉmentoj por reciproke batali „pro sia konfeso“. La sparko ekflamis en Prago (la akto de elĵeto de vic-regantoj el pragburgaj fenestroj estas konata kiel „defenestrado“; „-ado“ pro tio, ke ĝi estis jam dua; la unua okazis en la j. 1419), kaj oni povas iom cinike konstati: en Prago ĝi ankaŭ estingiĝis... Ĝi estingiĝis je la 8-a de septembro 1620 sur la altejo Bílá Hora (Blanka Monto), kiu superas la urbon. La forte disciplinita Ligo katolika (el tuta Eŭropo) disbatis la nehomogenan, ĉefe pro reciproka kverelado, la Protestantan union.

De tiam ekestis la t. n. „epoko de tenebro“ kiel nomis ĝin en sia verkaro (en la 19-a jrc.) Alois Jirásek, kiuj adoris la epokon husisman kaj malhele vidis la epokon post Bílá Hora. Sed ni asertu objektive, ke „la vero estas ie en la mezo“. Ekstariĝis forta katolikismo, kiu strebis neniigi la antaŭajn memstarecajn strebojn. La eduksistemon, precipe religiokoncerne, sed ankaŭ rilate al natursciencoj, transprenis la katolika ordeno de „jezuitoj“. Sed ja – la protestantoj, kiuj ne volis adaptiĝi, devis forlasi la patrolandon. Frunte de ili Komenio mem. Vojaĝante tra Eŭropo, li fariĝis „instruisto de nacioj“ en diversaj humanismaj fakoj. Ni, esperantistoj, substreku, ke li senembarase proklamadis, ke unuiĝinta, planita lingvo estas ebla!!

Sed ni substreku ankaŭ, ke danke al jezuitoj edukiĝis kaj instruiĝis multaj ĉeĥaj intelektuloj, kiuj strebis pliriĉigi la ĉehan lingvon, fari el ĝi la lingvon por literaturaj esprimoj taŭga. Unue ili klopodis pri la „pura“ ĉeĥa lingvo, elpensante eĉ humure sonantajn vortojn... Poste ili mem deiris de la postulo, devinte ekuzi pli taŭgajn vortojn germanajn – tial estas en la ĉeĥa ankaŭ vortradikoj germanaj.

En la menciita epoko torentis en nian landon multaj artistoj, arkitektoj, sciencistoj k.s. Kaj ĝuste danke al ili estas nia ĉefurbo nomata „baroka Prago“. Kaj ĉu iu vizitanto povus ne aprobi, ke ĝi estas belega? Malhela ĝi vere estis en la „malhela“ epoko de socialismo, sed nun ĝi bele brilas. Ĝi rekonstruiĝas ankaŭ danke al EU-monsubteno, tion oni devas akcepti kiel

fakton. Same disfloris ĉiuj urboj kaj vilaĝoj en nia(j) lando(j).

Reen al la historio... Ni jam menciis, ke niaj kleruloj strebis vekti la nacion almenaŭ en la intelekta kaj la spirita sferoj – tial la 18-a, la 19-a jarcentoj estas nomataj „epoko klerisma“. Ĝi ne estis tempo por la nacio tre sukcesplena – la habsburga imperiismo direktis, kaj ne nur en la ĉeĥaj landoj, pli kaj pli severajn, fortajn administrajn ilojn, kiuj – onidire – sufokis la naciojn.

Oni konas la naturan leĝon: pli forta premo kaŭzas pli fortan kontraŭpremon... kaj en tia senco iris ankaŭ nia historio. Pro deviga germaneco oni ekkonsciiĝis sian slavecon. Kaj kompreneble ili tendencis, inklinitis al la plej granda, la plej forta slava ŝtato – al Rusujo, ĉar ĉi tie oni esperis havi ŝirmon... Disvolviĝis „panslavismo“, kies deziro estis tutslava komprenemo kaj reciproka helpado. Kelkaj ĉeĥaj kleruloj vojaĝis en Pollandon, sed precipe en Rusujon por „per propraj spertoj...“. Unu el ili estis la ĵurnalisma famulo Karel Havlíček Borovský. Li forveturis, „sur la propra haŭto“ li travivis sperton en la imperiisma Rusujo, post 2 jaroj li revenis tute seniluziiginta... (ni akcentu la vorton „seniluzio“ por ne trakti la terminon denove koncerne nian modernan historion!).

La jaro 1914... Ne estis tiam en nia lando, kie ekflamis kontraŭhabsburga sparko – sed la Unua mondmilito, kiun ĝi kaŭzis (1914 - 1918), havis sian konsekvencon vere en la tuta mondo. La habsburga imperio-regno disfalis, ĝiaj unuopaj nacioj memstariĝis. Nun endas menciigi nomon de la klerulo, kiu plej meritis pri la instaliĝo de la nova ŝtata formo – do Ĉeĥoslovakia respubliko:

Tomáš Garrigue Masaryk – la unua ŝtata prezidento. Unue deklare videblas la vorto „slovaka“, ĉar ambaŭ niaj nacioj montris sian volon demonstri sian slavan fratecon tiel evidente. Slovakoj ĉiam prenis ĉeĥojn „siaj pli oldaj fratoj“, tio montriĝis jam en la 19-a jarcento, kiam kelkaj slovakoj havis eblon studi en la praga universitato, akcepti la ĉeĥan kulturon kaj konatiĝi kun la lingvo. Nun plenumiĝis la deziro... En la nova respubliko disfloris intereso pri najbaraj kulturoj, precipe pri la verkaro, ĉefe pri la granda rusa literaturo; eĉ tiomgrade, ke kelkaj poetoj verkis en la rusa lingvo, pri multaj tradukoj nedubante.

Dudek jarojn daŭris la demokratia evoluo. Poste ekflamis la Dua mondmilito. En la j. 1939...

Por nia ŝtato (do Ĉeĥoslovakio) ĝi komencis plu frue, jam en la septembro 1938, kiam en Munkeno oni okazigis t.n. „Munkenan kontrakton“, laŭ kiu ni devis forŝiri de niaj regionoj la partojn nomataj „Sudetoj“ kaj „revenigi“ ilin al la „Miljara germana regno“. El la ĉeĥaj landoj estis farita

PROTEKTORATO de Bohemio kaj Moravio sub germana administrado. El la lando slovaka estis, sub katolik-nacia insisto, farita la „Slovaka ŝtato“ (Slovenský štát), inklinanta al malamikeca naciismo. La eventoj „kirlis“ ambaŭ niajn naciojn, slovakoj poste eĉ pli multe ol ĉeĥoj suferis pro la germana naziismo. Konsidere al tio, ke en la lando troviĝis multo da „ciganoj“, kiujn la nazianoj neniigis.

La jaro 1945... fino de la milito... „Ĉu mi iru dekstren aŭ maldekstren“, demandas ĉiu princo sur la vojkruciĝo. Ni, denove la sama ŝtato – Ĉeĥoslovakia respubliko – en la jaro 1948 ekpaŝis „maldekstren“ (kvankam en geografia senco el Ĉeĥio tio estas dekstren). Nur post tiu ĉi jaro fariĝis „malhelo“ en nia demokratio, sub nova „protektoro“...

Dum la germana Protektorato en Bohemio kaj en Moravio estis multaj civitanoj, rezistemuloj ekzekutitaj. Ke la situacio povas ripeti sin, eksciiis kelkaj kleruloj en la nova respubliko, la stalinismaj procesoj en nia lando pruvis tion evidente, do ili troviĝis en paradoksa situacio: dum la milito ili ofertis sian vivon por rezisti al nazia reĝimo – ĉu oni nun faru la samon por defendi demokration en la komunisma reĝimo? Ni nomu unu el ili, tio estas ĝuste taŭga en nia hodiaŭa demokratia kunsidego: Přemysl Pitter. En sia junaĝo esperantisto (kiel la patrino), poste kristana humanisto. Li ofertoplene zorgis pri postmilitaj forlasitaj infanoj – judaj kaj germanaj. Komune, surloke. Pro sia humanec-sento li ne divenis, kiuj estas la infanoj „de amikoj“, kiuj „de malamikoj“. Ĉe grandaj obstakloj (flanke de samnacionoj kaj „popolaj ŝtatorganoj“) li savis la infanojn de malsatmorto; por parto da ili li longdaŭre trovadis gepatrojn, parencojn – kaj kie ne eblis – do li prizorgis la „leĝ-gepatrojn“... Pro tiaj humanecaj faroj li devis fuĝi el sia „demokratia lando“. Okazis nova paradoksa kondiĉo en lia vivo: en la bavaria tendaro VALKA por fuĝintoj li prizorgis siajn samlandanojn; sed ne nur tiujn. Kiam la situacio iom trankviliĝis, li estis invitita en Israelon, kie li ricevis la titolon: „Justulo inter nacioj“. Li ne povis reveni hejmen, ĉar intertempe (en la j.1968) okazis la interveno de „amikaj armeoj“... ktp., la konata afero! Přemysl Pitter do fariĝis verkisto, publicisto kaj publikiganto de ĉeĥaj aferoj kaj kulturo ĉu pres- ĉu elsendomaniere (en Svislando).

Ĉu menciindas jena afero en nia Esperanto-medio? Jes! Ĉar antaŭ nelonge eldonis unu lian verkon „Duchovní revoluce v srdci Evropy“ (Spirita revolucio en la koro de Eŭropo, trad. M. Turková) en sia eldonejo KAVA-PECH nia konata samideano Petro Chrdle. Ĉu ne menciigi ĝuste tiun aferon, en kiu feliĉe renkontiĝas kelkaj fenomenoj de nia intereso: pri historio de niaj (ĉeĥaj) landoj, pri nia(j) ŝtato(j), pri eminentuloj, kiuj meritendas, pri kulturo, pri humaneco kaj demokratio, iom pri nia nuna stato de la ŝtato, kiu estas ano de la Eŭropa Unio. Pri tiu aktualajo ni diris fakte nur

malmulton – sed vi mem prijuĝu la situacion, en kiu ni troviĝas, ĉar sekvas malgranda rakonto: antaŭ nelonge mi iris en Prago tra belaj historiaj stratetoj. Unu germana turisto petis min doni informon. Do mi donis... Apudiris juna rusa turisto kaj demandis: Ĉu vi povas tiel afable konduki al la germano, kies samlandanoj faris al via lando tiom da malbono? Mi respondis iel-tiel, ke jam pasis tiom da jaroj, ke militspertuloj preskaŭ ne plu vivas, ke junaj generacioj sur ambaŭ flankoj... ktp. Mi ne diris al tiu ruso: ho, junulo, se vi sciis, kia malamo regas nun, post la okupacio en la jaro 1968, kontraŭ rusoj?! Tiu ago ŝajne preskaŭ forŝoviĝis, kiel ni dankis al rusaj soldatoj en la jaro 1945, ni preskaŭ ne pensas pri tio, ke rusoj fordonis siajn vivojn ankaŭ por nia liberigo... Mi ne diris tion, ĉar mi komprenis, ke tiu junulo scias nur duonon de historiaj aferoj, kial do mi nun sur la strato semu dubojn, malopiniojn...? Ĉar – kiu pravus? Vi mem prijuĝu.

Jaro 1918 laŭ la kroniko de la Esperantista klubo en Prago

1918-02-15 Esperantista Klubo en Prago okazigis en kafejo Union ĝeneralan kunvenon, kiu elektis prezidanton Josef Eiselt.

1918-02-22 Esperantista Fraŭlina Rondeto en Prago aranĝis en Ženský klub český (Ĉeĥa Virina Klubo) amuzan vespereton, kiun ĉeestis ankaŭ la poeto Stanislav Schulhof el Pardubice.

Fraŭlina Rondeto Esperantista, gvidata de f-ino Šupichová, aranĝis komune kun la Esperantista Klubo kaj Esperantista Societo brilan festvesperon, per kiu oni memoris la morton de D-ro Zamenhof. Tiu ĉi vespero helpis al la konkordiĝo de la esperantistoj en Prago.

1918-11-05 La kunveno de Bohema Societo Esperantista estis la unua en la libera Ĉeĥoslovaka ŝtato. Ĝi festis la 60-an naskiĝjaron de filozofo, univ. prof. , D-ro Fr. Krejčí, unu el honoraj prezidintoj de la Krakova kongreso. Pri lia vivo kaj laboro parolis S. Kamaryt.

1918-11-12 Fraŭlina Rondeto aranĝis intiman vespereton por festi la konstituiĝon de la Ĉs. Respubliko. F-ino Šupichová parolis „Pri la devo de esperantistoj en la nova ŝtato“.

Esperanta flago (laboro de Fraŭlina Rondeto) flirtas sur la domo de kafejo „Union“.

En la kafejo troviĝas oficejo por informa servo al esperantistoj, kie ĉiutage oficas f-ino Moudrá de la 2-a ĝis la 7-a horo posttagmeze.

1918-11-19 la kunvenon de BSE partoprenis la unuaj revenintoj el bataalkampoj: prof. Pitlík, R. Šada, la redaktoro de la Kulturo M. Lukáš.

Kompilis Jiří Patera

La 28-a de oktobro 1918 en Nový Knín

Josef Valenta

Estis lunda posttagmezo la 28-an de oktobro de la jaro 1918. Pri tio, kio antaŭtagmeze en Prago okazis, ni ne havis informojn. Per la fabrika telefono ĉe s. Masner ni ricevis sciigon el Prago, ke Aŭstrio akceptas pacajn kondiĉojn deklaritaj de Wilson kaj Prago estas vigla kaj surpiede. Plu ni trovis nenion, ĉar ne eblis telefone rekonekti kun Prago la tutan tagon. Posttagmeza trajno veturanta al Prago estis troplena. En Nová Ves entrjniĝis oficiroj konvaleskantoj, kiuj trapasis unuopaj vagonoj kaj anstataŭigis al la senrangulojn aŭstrajn insignojn per naciaj kokardoj. Plu da novaĵoj alportis tiuj, kiuj en Prago travivis la unuajn ĝojan tremetojn de la naskiĝanta libereco kaj alvenis per vespera trajno. Ĉirkaŭ ili formiĝis grupetoj de scivolemuloj streĉe aŭskultantaj rakontadon; demandoj amasiĝis, specialaj eldonaĵoj de gazetoj kuris de mano en manon. Al unuaj ili parolis, aliaj venis kaj rakontado ne ĉesis. Jam antaŭ longe mallumo disvastiĝis en stratojn, tie kaj tie palpebruma lumeto lumigis fenestretojn de ĉambroj, sed sur stratoj kaj sur la placo estis plene da parolado.

Eble nur tiu, kiu estis litmalsana kun hispana gripo, restis hejme. Tiu, kiu estis sana, al tiu hejme ĉio premis, li devis dividi ĝojon kun iu. Kvankam la aero estis supersaturita de vaporoj, oni spiris tiel leĝere. Gastejoj reviviĝis kaj dekretita taga porciumo ne estis respektita. Frato Fon ja ankoraŭ ne sekiĝis tute kaj de tiu beta trinkaĵo¹ malenviis al ĉiuj laŭapetite. Sinjoro Nešuta, la knina ĉefbierfaristo, ja certigis ĉiujn, ke li ne kuiris bieron de kviko, sed de sukero kaj beto. Estu li laŭdita, ke li havis de tiu „likva biero“ kuiritan sufiĉan kvanton kaj ni havis do nur malmulte da senbieraj tagojn. Ĉe Mikulášek-oj oni abunde trinkis ankaŭ moston, importitan de ie en Stirio.

En la fabriko de Jan Masner oni lumigis ĝis malfrua nokto. Oni komponis ĉi tie programon de festo por la venonta tago. Aŭtoritaton de la fabrikisto Jan Masner oni ĝenerale rekonis, li ĉiam staris ĉe kapo de tuta publika vivo. Li iĝis vera mecenato de la popolo dum tempoj la plej gravaj, li kuracis vundaĵojn kaj sekigis larmojn. Al noktogardisto sinjoro Fiala oni en la fabriko ordonis, ke tuj matene li tamburanoncos la ŝtatan renverson. Tio estis efektiva per solena maniero. Sian tamburon li ĉirkaŭkronis kaj lernis diskurson, per kio li sian mision sukcese plenumis. Ĉe sono de tiu ĉi tamburo marŝis la knina gvardio al Prago en la revolucia jaro 1848.

¹ Beta biero farata dum milito.



Tuj en fruaj matenaj horoj okazis en la urbodomo solena kunveno de civita deputitaro, dum kiu estis nomitaj kiel honoraj civitanoj Dr-o. T. G. Masaryk, deputitoj Dr-o. Karel Kramář, G. Haberman, Fr. Staněk kaj majstro Alois Jirásek. Por la 10-a horo oni kunvokis sur la placon popolamasiĝon. Civitanoj formigis grupetojn kaj vive diskutis. La placo rapide pleniĝis de lokuloj kaj transkampuloj. Ĉiuj domoj estis dekoraciitaj de ruĝo-blankaj flagoj. Iu ankaŭ rimarkis la aŭstran aglon, kiu estis sur urbodoma turo. Tuj ofertis sin helpema ladaĵista majstro sinjoro Černoch, kiu grimpis la turon kaj dum ĝojkrio ĵetis la aglon malsupren sur pavimon. Por ke la Monarĥio simbole „mortu“, haŭlis

ĝin junularo en ŝnuro al Kocabo kaj el la ponteto ĵetis ĝin en akvon. Simila sorto atingis tuj ankaŭ ĉiujn agletojn de tabakvendejoj kaj ŝtataj oficejoj. Post la finiĝo de la kunveno de la civita deputitaro formis asocioj, lerneja junularo kaj civitanoj antaŭ la urbodomo ortangulon kaj de ĝia mezo ekparolis fabrikisto Jan Masner pri la signifo de tiu ĉi tago kaj mallonge tuŝis la historion de la nacio ekde la Blanka monto ĝis la redono de la regado en la manojn de la Nacia komitato. En multaj vizaĝoj videblis ĝoja kortuŝo, larmoj de ĝojo fluis libere sur vangoj. Poste li legis la unuan leĝon de la Nacia komitato kaj ĝia deklaro komencanta kun vortoj „Via deeterna revo efektiviĝis!“. Leĝon kaj deklaron akompanis krioj „Vivu!“ al prezidento Masaryk kaj Wilson, kapelo ludis la nacian kaj la slavan himnojn, kiuj estis adore akompanitaj de kanto. El speciala eldono de revuo oni ankoraŭ legis pri lastaj okazintaĵoj. Lib. Masner recitis kanton, laŭdantan gloragojn de francaj legianoj. Popolo kaj lerneja junularo vicigis sin en procesian marŝantaron, kiu kun civita deputitaro en kapo kun muziko trapasis la urbon. En digna kvieto reveninte sur la placon ĉiuj disiris al siaj hejmoj.

Tradukis Tomáš Břicháček

Deklaracio de la Nacia komitato ĉeĥoslovaka pri la sendependeco de la ĉeĥoslovaka ŝtato de la 28-a de oktobro 1918

Popolo ĉeĥoslovaka!

Via deeterna revo efektiviĝis. Ŝtato ĉeĥoslovaka eniris la hodiaŭan tagon en la vico de memstaraj, liberaj, kulturaj ŝtatoj de la mondo. La Nacia komitato, feliĉigita de konfido de kompleta popolo ĉeĥoslovaka, transprenis kiel unika legitima kaj respondeca aganto en siajn manojn administradon de Via ŝtato.

Popolo ĉeĥoslovaka! Ĉio, kion vi entreprenas, vi entreprenas ekde tiu ĉi momento kiel nova libera membro de granda familio de memstaraj liberaj nacioj.

Per novaj agoj en ĉi tiuj tempetoj komenciĝas nova, espereble glora historio Via.

Vi ne trompos atendojn de la tuta kultura mondo, kiu kun beno sur lipoj rememoras Via fama historio, kiu kulminis en senmortaj agoj de ĉeĥoslovakaj legioj en okcidenta batalkampo kaj en Siberio. La tuta mondo observas Viajn paŝojn en novan vivon, Vian eniron en landon promesitan. Konservu puran ŝildon, kiel konservis ĝin Via nacia armeo: Ĉeĥoslovakaj legioj! Konsciu ĉiam, ke Vi estas civitano de la nova ŝtato ne nur per ĉiuj rajtoj, sed ankaŭ per devoj.

En la komenco de granda verko taskas al Vi la Nacia komitato, ekde hodiaŭ Via registaro, ke Via konduto kaj Via ĝojo estu dignaj de la granda momento nuna! Niaj liberigintoj, Masaryk kaj Wilson, ne devas esti desapontitaj en sia konvinko, ke ili venkoprenis liberecon por popolo, kiu scipovas regi al si mem. Eĉ ne unu perturba ago povas malagrabligi nunajn grandajn momentojn, eĉ ne unu el Vi rajtas kulpigi ion, kio povus ĵeti ombbron sur puran nomon de la nacio.

Ĉiu el Vi devas senrezerve respekti ĉion, kio estas sankta al aliulo.

Nek persona libereco nek posedaĵo privata devas esti difektitaj. Submetiĝu senkondiĉe al ordonoj de la Nacia komitato!

En Prago, la 28-an de oktobro 1918

Nome de la Nacia komitato ĉeĥoslovaka:

Dr. Frant. Soukup

Jiří Stříbrný

Dr. Šrobar

Ant. Švehla

JUDr. Al. Rašín

Tradukis Tomáš Břicháček

Maljuna arbo *Interparoloj kun TGM*

T. G. Masaryk / Karel Čapek

Rigardu la maljunan kverkon; laŭdire ĝi estas naŭcentjara, tamen, kiel forta ĝi estas, kiom da vivo estas en ĝi! Tiu grandeco nek tiu maljuneco obstaklas al ĝi kreskigi novajn foliojn kaj flori. La homo devus esti simile maljuniĝanta. Ĝisvivi cent jarojn, tio ne devus esti ia lertaĵo - kompreneble, per tiuj artefaritaj, kontraŭnaturaj rimedoj oni ne atingos tion. Kreski en freŝa aero kaj sub la suno, racie manĝi kaj trinki, vivi laŭetike, labori per la muskoloj, per la koro, per la cerbo, havi zorgojn, havi celon - jen la tuta recepto makrobiotika. Kaj ne perdi vivan intereson: ĉar intereso, jen ĝuste la vivo mem, sen intereso kaj amo la vivo ne ekzistas.



Ni tro taksas la vivon de unu vidpunkto: laŭ ties longeco, kaj ne laŭ ties grandeco. Ni pli multe cerbumas pri tio, kiel la vivon plilongigi, ol pri tio, kiel ĝin vere plenigi. Multaj homoj timas la morton, sed neniom gravas por ili, ke ili mem kaj tiomaj aliaj vivas fakte nur

duonvivon, sen enhavo, sen amo, sen ĝojo. En ekkono de vero, en etika ordo, en efika amo ni jam en ĉi tiu vivo partoprenas la eternecon - ni plilongigas sian vivon ne je tagoj aŭ jaroj, sed je la eterno. Estas bone, ke ni penas plilongigi homan vivon; tamen plie ni valorigu ĝin. Iam-tiam revenas al mi sonĝo, mi ne scias, de kie ĝi aperis, eble el ia bildo: ŝipo sur la maro kaj super ĝi kliniĝas anĝelo kun horloĝo; de tempo al tempo defluas el la horloĝo guto en la maron kaj la anĝelo diras: Denove unu minuto pasis. La sonĝon mi ĉiam konsideras averto: Aktivu, laboru, dum viaj minutoj pasas.

Multaj homoj maljuniĝas nur pro komfortemo, ĉar ili ne plu volas ion fari. Ne maljuniĝadi, tio ne estas nur konservi sin, sed ĉiam kreski, ĉiam akiradi; ĉiu jaro estu, kvazaŭ la homo ascendus surskale pluan ŝtupon. Mi mem atentis, ĉu mi maljuniĝas; mi kontrolas miajn spiritkapablojn, memoron, kapablon kombini kaj ceteron. Kiam mi vidus min perdanta ian ĉefan kapablon, tuj mi liberigos mian lokon por la pli junaj.

Tradukis Vladimír Türk

Farsaĵo kun la Parko de Morávek

Tomáš Břicháček

Li kredis je Dio kaj je siaj pistoloj, tamen je historieto, kiu okazos dekoj da jaroj post lia morto dum oficperiodo de magistratestro Adriana Krnáčová, la staba kapitano Václav Morávek tute certe ne kredus.

La 15-an de decembro 2015 magistrato de la ĉefurbo Prago laŭdinde anoncis, ke nove ekestinta parka areo proksime de la kruciĝo de la strato Svatovítská kaj avenuo de Milada Horáková portos la nomon Parko de Morávek. Intenco onidire estis memorigi eminentan partoprenanton de la 2-a rezistmovado per nomigo de la parko en lokoj, kie Václav Morávek falis en batalo (la 21-an de marto 1942) kaj kie troviĝas lia renovigita monumenteto.

La 28-an de julio 2016 la parko estis solene inaŭgurita en ĉeesto de la vicmagistratestro Petr Dolínek kaj de la vickvartalestro de Prago 6 Martin Polách. Ridetoj de politikistoj brilis, fontanoj ŝprucis, fotiloj klakis kaj eble fluis ankaŭ iom da ĉampano.

Bedaŭrinde tuj ekestis problemo. Vickvartalestro de Prago 6 por kulturo kaj lernejaferoj Jan Lacina komencis dubigi la nomon pro okazinta artista konkurso je projekto de statuo. „Venkanta propono de statuo de Maria Terezia ŝajnas al mi tre bone farita. Situacion iomete komplikas la nuna nomo Parko de Morávek. Ni plej verŝajne petos la pragan topografian komisionon pri ŝanĝo.“ Li supozis renomigon je Parko de Maria Terezia. Al Morávek li lasus nordan angulon de la parko malantaŭ la subtera pasejo ĉirkaŭ la monumenteto.

Kvankam intertempe aperis logika propono, ke en la parkon oni instalu monumenton honore al t. n. Tri reĝoj – rezistantoj Mašín, Morávek kaj Balabán – Prago 6 insistis pri statuo de la aŭstra regantino. En majo 2017 oni surmetis fundamentan ŝtonon kaj la kvartalo iniciatis proceson de renomigo en la formo, kiel pri ĝi parolis Lacina.

En topografiaj komisionoj de Prago 6 kaj de la ĉefurbo Prago propono trapasis senprobleme. Neniu demandis, pro kiu grava historia mispaŝo oni senigu Morávek-on de la parko. Ĉu ja estas kutime fari ion similan pro aliaj kialoj? Estraro de la kvartalo Prago 6 poste la 4-an de aprilo 2018 oficiale prezentis iniciaton al renomigo.

Se temas pri traktado en la topografia komisiono de la ĉefurbo Prago, estas interese, ke en la kazo de la Parko de Morávek en februaro 2018 la komisiono nure konstatis: „*Konkludo de la diskuto estis tia, ke ĉiuj ĉeestantaj konsentas pri la renomigo de la suda parto de la Parko de Morávek per la nomo Parko de Maria Terezia, dum la nomo de la norda parto de la Parko de Morávek restos.*“ Ja nelonge poste ĉi tie male ne sukcesis propono de renomigo de la strato de Šmeral, „ĉar laŭ la opinio de

la komisiono la figuro de Bohumír Šmeral apartenas al alia kategorio ol plimulto da personoj, kiuj komence de la 90-aj jaroj tute meritite forlasis la topografian panteonon. Kaj tio ĉefe tial, ĉar Bohumír Šmeral ne ĝisvivis la komunistam golpon en la jaro 1948 kaj pro tio oni ne povas asociigi lin rekte kun politikaj krimoj, precipe kun la krima misuzo de la ŝtata povo, kiu okazis amase post tiu golpo. Krome la renomigo de la strato de Schnell per la nomo de Šmeral efektiviĝis ankoraŭ antaŭ la jaro 1948 – la kialo estis, ke Šmeral en tiu strato antaŭ la Dua Mondmilito loĝis.“ – Rimarkinde malsama pritraktado de heroo de la rezistmovado unuflanke kaj kun iama prominenta bolŝeviko aliflanke.

Estu kiel ajn la konsilio de la ĉefurbo Prago proponon de renomigo la 17-an de julio 2018 aprobis. Lakona decidargumentado tekstis: „*La propono de renomigo estas prezentata laŭ peto de la urbkvartalo konekse kun la pasintjara meto de la fundamenta ŝtono al venonta monumento de signifa eŭropa regantino. La topografia komisiono subtenas la proponon.*“

Al la staba kapitano Morávek magistratanoj bonvole lasis tiun pinton de la parko norde de la veturvojo. Ili eble havis impreson, ke eĉ pro tiuj kelkaj kvadratmetroj da herbejo inter la enveturejo al tunelo kaj la subirejo sub la veturvojo li devus esti dankema. Oni ja povis forigi al li ankaŭ ĝin.

En la 100-jara jubileo de la respubliko ŝanĝi la nomon de publika areo, kiu estis nur du jarojn antaŭe nomita honore al patrioto kaj rezistanto, kaj dediĉi ĝin al habsburga imperiestrino, tion vi ne elpensus!

Mi ne rifuzas (kontraste al iuj) favoran rememoradon de la epoko de Aŭstrio kaj malenvias al Maria Terezia aŭ eble eĉ al la imperiestro Francisko Jozefo I. omaĝon. Sed ĉi tiel nepre ne indas fari tion.



POETINO EVA PECHOVÁ

Ĉeĥa poetino sukcesis en Esperantlingva konkurso

Franca revuo *Le monde de l'Esperanto* (N-ro 601) informis post ferioj pri la rezultoj de la konkurso *Poésie en liberté*, kiu okazis ĉi-jare ankaŭ en Esperanto. Ni kun plezuro eksciis pri la sukceso de la ĉeĥa partoprenantino Eva Pechová en la Esperanta kategorio. Sube ni citas la artikolon:

Esperanto en franca poezia konkurso

Majofine kuniĝis la du ĵurioj (france kaj Esperante) de la konkurso Poésie-en-liberté/Poezio-tut'libera 2018 en la franca Ministerio pri edukado. Ili estis akceptitaj de Dominique Pince-Salem, respondeculo en la Ministerio. Franclingve partoprenis 4000 junuloj inter 15- kaj 25-jaraĝaj el 65 landoj. En la ĵurio kunsidis 15 junuloj kaj la prezidanto estis la poeto Etienne Orsini.

Unuafoje Esperanto estis akceptita kiel lingvo de tiu konkurso. Por la Esperanta ĵurio kunsidis Jesper Jacobsen, Jorge Camacho kaj Nicola Ruggiero. Esperantlingve partoprenis 48 junuloj el 20 landoj, la plimulto inter 16- kaj 19-jaraĝaj.

25 studas en mezlernejo (liceo/gimnazio): 22 el Francio, 4 el Turkio, 3 el Britio, 3 el Venezuelo, ktp.

La nivelo de la lingvo estis tre diversa. Ŝajnas, ke multaj eklernis Esperanton por partopreni la konkurson; tio montras, ke tia konkurso povas esti alloga al la lingvo.

1-a premio: Ingrid Berglund, el Sundsvall, Svedio, por „La devoj de la vivo“.

2-a premio: Elisa Estévez, el Tabio, Kolombio, por „Ni estos vortoj“.

3-a premio: Eva Pechová, el Prago, Ĉeĥio por „Senti la momenton“.

La rezultoj estos oficiale anoncataj la 2-an de julio en Universitato La Sorbonne. En oktobro ĉiuj premiitaj poemoj estos eldonataj en libro. La 22-an de novembro okazos granda ceremonio en Parizo, al kiu estos invitataj la gajnintoj.

Gilles Tabard

Poésie en liberté estas internacia konkurso de poezio por junuloj. Ĝi estas organizata de la Asocio Poésie en liberté ekde 1998. Ĝis nun, la poemoj estis nur franclingvaj. En 2018, por la 20-a eldono, dank' al la ago de Espéranto-France, eblis ankaŭ verki poemojn Esperante. Povis partopreni junuloj aĝaj de 15 ĝis 25 jaroj el ĉiuj landoj. La partopreno konsistis en sendo (uzante retformularon) de neeldonita poemo, versa aŭ proza, kun maksimume 30 versoj aŭ 30 linioj. Kandidatoj principe rajtis sendi po unu poemon, sed eblis sendi po unu en ĉiu el la lingvoj franca kaj Esperanta. Partopreno okazis ekde la 1-a de januaro ĝis la 30-a de aprilo 2018.

Pli da informoj troveblas ĉe www.poesie-en-liberte.fr.

O laureátce



Eva Pechová je studentkou Vysoké školy umělecko-průmyslové v Praze v ateliéru sochařství. V současnosti nicméně svoje působení zde přerušila a studuje ve Francii na École supérieure des beaux-arts de Nîmes.

Svoje umělecké zaměření popisuje následovně: „Zajímá mě přítomný okamžik. Pátrám po určité poezii přítomnosti, mé poezii, obsažené ve strukturách a rozměrech. Hledám vlastní komunikační jazyk. Ať je má tvorba čistě konceptuální nebo ne, je také výrazem mých intuitivních pohnutek.

Jde mi o různé procesy tvorby, které v sobě často odráží každodennost. Tím, jak se vtiskují do materiálů, přetváří v prostoru, materializují počáteční myšlenku, nacházím tvary mých soch a objektů.

Hledám pohyb uvnitř formy, její původ, příběh, který jí předchází a později i rozkládá. Je to právě rozrůzněná funkce předmětu, hmoty, jeho paměť, která mě fascinuje a nutí k úvahám. Umělecké dílo pro mě znamená výsledek určitého děje, akce, pohybu, který nemusí být nutně hmotný a trvanlivý. Je často spojený se zážitkem našich těl v prostoru, takže do velké míry hmatatelný a smyslový.

Na jedné straně se nabízí otázka: „Co je socha?“ A na druhé je tu potřeba neustále se ptát a ujišťovat: „K čemu je toto umění?“ Snažím se proto definovat si sochařství a umění v čase, čelit jejich limitům. Používám k tomu různá média tvorby a snažím se je posunout ještě dál, až na rozcestí dalších podstatných otázek.“

~ HRA SE SLOVY ~ **SITE SPECIFIC** ~ ARCHEOLOGIE ČASU ~

JAZYK ~ **ZTRÁTY & NÁLEZY** ~ NECHAT PROMLOUVAT MATERIÁLY

~ INTUITIVNÍ HLEDÁNÍ ~ TĚLO A JEHO PROSTOR ~ **DIALOG** | ~

PROCESUÁLNÍ SOCHY ~ RECYKLOVAT ~ KOMUNIKACE ~

PAMĚŤ PŘEDMĚTU ~ **KOLÁŽE** ~ **POJMENOVAT PRÁZDNO** ~

POMÍJIVOST ~ **INSTALACE** ~ NECHAT EXISTOVAT ~

EXISTOVAT ~

Rozhovor

Eva Pechová laskavě na dálku z Francie poskytla Bultenu rozhovor. Ptali jsme se na soutěž *Poésie en liberté*, na její uměleckou tvorbu i na esperanto. Děkujeme, že si na nás našla čas, a přejeme mnoho dalších úspěchů, tvůrčího elánu a třeba i zážitků s esperantem.

Je psaní poezie Váš koníček?

Psaní poezie není rozhodně jenom můj koníček, tak bych to nenazvala. Poezie je součástí mé tvorby a stále víc se jí snažím propojovat i se svou aktuální sochařskou a uměleckou praxí. Ke konci tohoto roku vyjde v Paříži má básnická sbírka ve francouzštině.

Soutěže Poésie-en-liberté jste se účastnila opakovaně. Jak jste se k ní dostala?

Když jsem byla na gymnáziu, měli jsme *atelier d'écriture* s francouzským spisovatelem Bernardem Friotem. S ním jsme tak trochu experimentovali na téma psaní poezie. O soutěži se zmínil spíš okrajově. Více jsem se o ní pak dozvěděla, když mi profesorka francouzštiny řekla, že moje báseň byla vybrána a bude poslána do této soutěže. Potom jsem si o ní začala pochopitelně zjišťovat víc informací.

Měla jste v ní už v minulosti úspěchy?

Od roku 2013 se soutěže téměř bez přestávky opakovaně účastním s výjimkou roku 2014, kdy jsem měla možnost být členem poroty soutěže a přímo rozhodovat o udělování jednotlivých cen. Několikrát po sobě jsem získala ceny a mé básně byly vytištěny ve společné sbírce (2015, 2016, 2017).

Studujete výtvarná umění, obor sochařství. Hledáte průniky mezi výtvarným uměním a poezií?

Poezie je něco, co mě každodenně inspiruje. V mých sochařských pracích se právě stále více pokouším o to uplatnit také to, co píši. Nemůžu říct, že se mi to vždy úspěšně daří, jsem stále ještě na cestě hledání. Toto propojení pokládám ale ve své tvorbě za podstatné a chci, aby to časem bylo mnohem patrnější než dosud. I když se pořád víc vnímám jako „básník, který se snaží o umění“ než umělec, co píše básně.

Jak se v soutěži, která vždy probíhala ve francouzštině, najednou vzalo esperanto?

Viceprezident soutěže (Gilles Tabard) je totiž esperantista. U příležitosti 20. výročí nabídl předsedovi *Poésie-en-liberté* (Jean-Marc Muller) tuto novou iniciativu. Myšlenka byla dobře přijata, jelikož umožnila otevřít soutěž něčemu novému, ne nutně spojenému s frankofonními soutěžícími. Vlastně tak vznikla nová kategorie v rámci soutěže a zároveň tak trochu mimo ni s vlastní porotou esperantistů, kterou by, jak jsem se dozvěděla, chtěli do budoucna zachovat a dále rozvíjet.

Naučila jste se esperanto až kvůli účasti v soutěži?

Esperanto jsem se začala učit z vlastního zájmu rok předtím, než jsem se mohla účastnit soutěže. V létě 2017 jsem byla na esperantistické stáži v Château Grésillon ve Francii, kde se tradičně několikrát do roka setkávají esperantisté, a kde se vyučuje esperanto. To, že jsem najednou mezi ostatními kategoriemi *Poésie-en-liberté* uviděla cenu pro básně v esperantu pro mě byla velice překvapující shoda okolností.

Co vás vedlo k tomu přihlásit se do esperantské části soutěže?

Bylo to nejspíš to příjemné překvapení, ta změna, že najednou můžeme zkusit poslat do soutěže i básně v esperantu, a to, že jsem se začala esperanto shodou okolností učit. A také mě samotnou zajímalo zkusit si napsat báseň v esperantu a předložit ji esperantské porotě, čistě tak ze zvědavosti.

Jak jste se esperanto učila?

Esperanto jsem se začala učit na internetu prostřednictvím stránek ikurso, poté jsem byla na zmíněné jazykové stáži. A v současnosti se ještě pořád učím. Chodím na hodiny esperanta, které pořádá Maison de l'Europe v Nîmes, kde aktuálně studuji na École des beaux-arts.

Jaké úrovně znalosti jste dosáhla?

Úplně nedokážu odhadnout. Osvojila jsem si základy, zvládám základní porozumění textu, konverzaci. Co se týče gramatiky a pravidel je esperanto naučitelné opravdu snadno a rychle. Další věc je ještě aktivní používání jazyka, ke kterému se teprve dopracovávám.

Měla jste možnost vyzkoušet si jazyk v praxi? Poznala jste nějaké francouzské esperantisty?

Jak jazyk funguje v praxi, jsem poprvé zažila na esperantistické stáži. Přišlo mi až neuvěřitelné, že může takhle dobře fungovat. Setkala jsem se tam s několika esperantisty, často právě Francouzi, z nichž někteří měli za sebou už několikaletou praxi s esperantem. Byl to každopádně zážitek.

Myslíte, že vám esperanto i po skončení soutěže může být v životě užitečné?

Myslím si, že naučit se esperanto rozhodně není k zahození. Může posloužit jako dobrý základ k tomu naučit se další jazyky a také nabízí možnost cestovat a setkávat se s esperantisty z celého světa prostřednictvím Pasporta Servo. A možná časem najdu i nějaké propojení mezi esperantem a mou tvorbou, kdy mi esperanto může posloužit jako „univerzální jazyk“ specifické komunity esperantistů. Rozhodně si myslím, že se dá v rámci esperanta najít zajímavý potenciál, nový horizont pro něco dalšího.

Co vás inspirovalo k napsání básně „Senti la momenton“? Souvisí to s tím, že ve vašem uměleckém portfoliu o sobě píšete, že vás zajímá přítomný okamžik?

Nepřímo to spolu svým způsobem souvisí. Jak v umělecké tvorbě, tak i v poezii, co píšete do velké míry kladu důraz právě na přítomný okamžik, pomíjivost a snahu zachytit existující v čase. Báseň „Senti la momenton“ vznikla právě podobnou hrou s přítomností a akumulací obrazů, toho, co je bezprostředně teď a tady. Zároveň je to i takový „lingvistický experiment“ na pomezí francouzštiny a esperanta, jelikož vznikla jako určitá „derivace“ velmi podobné francouzské básně, ne však jako její překlad. V rámci esperanta jsem se vlastně snažila o to znovu oživit onen přítomný okamžik zachovaný ve francouzské básni a vytvořit tak báseň novou v jazykových možnostech esperanta.



Senti la momenton

Eva Pechová

Sentir le moment

Senti la momenton en sia haŭto

kiam ĝi senvestigas

tiun momenton lumantan

kiam la parfumo de la mateno

de la suno sur la cilioj

ĝenas tian foreston

sub la kolonoj de lumoj

La amorajto

La sendenta karmo

La belgrajno kiu ne malaperas

La kadenco de deliraĵo

La perdaj folioj elspiras la distancojn

Kiel pensi

Ne forgesi spiri

Tie kaj ĉi tie

La pavimo reflektas ankoraŭ

la larmojn de pluvo

Eksenti ĉiam

ĉi tiun saman solecon

La larma pluvo

kun plia foresto

Imiti la ritmon de tiu ebena pluvo

La resto de perdoj

kun la konturoj forestantaj

Sentir le moment sur sa peau

quand elle déshabille

ce moment lumineux

quand le parfum du matin

du soleil sur les cils

empêche ton départ

sous les colonnes de lumières

Le droit d'aimer

Le karma désarmé

Le grain de beauté qui ne disparaît pas

La cadence d'un délire

Les feuilles perdues expirent les distances

Comment penser

Ne pas oublier de respirer

Ici et là

Le pavé reflète encore

les larmes de pluie

Ressentir toujours

cette semblable solitude

La larmoyante pluie

pour un autre départ

Imiter le rythme de cette pluie d'ébène

Le reste de nos pertes

avec les contours absents



B U L T E N O
de Esperantista Klubo en Prago
Časopis Klubu esperantistů v Praze
Redaktor: Tomáš Břicháček

Vydavatel:

Klub esperantistů v Praze

pobočný spolek Českého esperantského svazu, z. s.

IČO 66004322

C/o Jiří Mišurec

Jirečkova 5

170 00 Praha 7